Antaŭ ni disvolviĝas la malfacila konspira laboro luktanta kun daŭra manko de monrimedoj, kiu eĉ devigis la komitatojn per teroro kontraŭ la riĉajn bulgarajn turkhelpantojn havigi monon por la armiloj. Tia dangerega laboro kun siaj brilaj agoj de sinofero kaj heroeco havis ankaŭ siajn ombrajn flankojn, erarojn en la konspira agado kun ies malfidebligoj kaj perfidoj, kiuj fine venigis la revoluciulon Levski la 6-an de februaro 1873, do apenau 5 jarojn antaŭ liberigo de Bulgario, sub la turkan pendumilon. Nur la historio plene aprezis la bravulon. La instrua kaj interesa libro meritas tralegon. Ĝia lingva kvalito estas bona. Almetita estas listo de korektoj. Pri plujaj nelistitaj korektindaĵoj mi informas la tradukinton.

J. Kořínek

MARGÈNE DE LA LERNOLIBRO. De Bernard Golden. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1982. Kajero 60-paĝa, formato 14 x 20 cm, prezo 30 Ft.

Al la aprezinda vico da publikaĵoj far HEA en la lasta tempo jen aldoniĝas plua salutinda verketo de fama esperantologo B. Golden. La kajero prezentas kolekton de diversgazete aperintaj prilingvaj studoj de akrevida lingva spertulo. Li montiras ne nur erarojn faratajn de hungaroj, sed ankaŭ de alilingvanoj pro influo de etnaj lingvoj aŭ pro nesufiĉa lingvoscio. Tiaj aperas kelkfoje eĉ de konataj aŭtoroj, kiel li indikas. Kun simpatio mi legas lian rekomendon de pli kurtaj formoj kiel ordi, loki ks, kiuj laŭ la reguloj de vortfarado kiel radiokoj substantivaj plene taugas. La sufikso -ig necesas nur por esprimo de koncerna ago: ordigo, lokigo, nomigo, finiĝo ks. Same plurajn formojn kun -acio, -acii, -ioii eblas taŭge kurtigi: aboli /aboliicii/, diskrimini /diskriminacii/; escepte se la pli vasta formo havas specialan signifon semantikan: okupi /larga senco/, okupacii /militiste okupi/, ks. Pri skribo de propraj nomoj mi plene konsentas kun la aŭtoro, nome laŭeble konservi la etnan ortografion kaj enkrampe doni la proksimuman Esp. prononcon: Beaumarchais /Bomarŝe/, Bystřice /Bistrjice /. Legante tekstojn de "Rikardo Sulco", mi ĉiam rememoras pri unu eksklubano en Brno, kiu siatempe skribis "Teodoro Ĉejko en Bystřico sub Hostýno", sed li estis iom mensfebla. Por nomoj el landoj neuzantaj Latinan alfabeton estus plej bone lasi fonetikan transkribon: Ĉajkovskij, Voronej, Joŝito, Koogeeu Niŝimura ks. Kial skribi Yoshito, Nishimura?

La sagacajn studojn kaj observojn de Golden legos ĉiu kun vera intereso kaj ĉerpos el ili utilajn instruojn. Lingve estas la verko altnivela kaj sen preseraroj.

J. Kořínek

DOLĈA GUSTO DE L' PACO. Kolekto Hibisko. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo 1982. Kajero 50-paĝa, formato 12 x 16 cm. Eblas mendii ĉe ĈEA. Prezo Kcs 4,---.

En traduko de Nguyen Minh Kinh kaj Dang Dinh Dam prezentiĝas al ni du rakontoj kaj unu fabelo el Vjetnamio. En la unua rakonto de Ngo Thi Kim Cuc el 1979 gvidas nin la aŭtoro en la postmilitan Sajgonon, nun Ho Ĉi Minh-urbon, el kiu en tiu malfacilega kaj abnegaciiga tempo fugadas okcidenten homoj malpa-

cienciaj, bonfartemaj, karieravidaĵaj. Sed ni renkontas inter multaj firmkarakteraj du virojn kaj unu virinon, kiuj rezistas al tentoĵ kaj logoĵ de elmigrintoĵ kaj en la peza tempo ne forlasis sian liberigintan patrimon kaj pretas helpi honeste ĉe la rekonstruo de la suferinta hejmlando.

En la dua rakonto Anh Duc konigas al ni sorton de almozulo el jaro 1976, kiu blindigis kiel soldato de la Sajgona pupregima armeo. La venkinta popolregimo ĉiujn ĉi eksajn kontraŭulojn, vunditojn kaj kriplulojn grandanime indulgas kaj reeduke ebligas al ili homindan vivon.

La tria estas vjetnama fabelo. La tuto estas prezentita en tre bona lingvaĵo, sen preseraroĵ. Mi trovis nur tri korektindaĵojn: Sur pagoĵ 39 kaj 43 mi rekomendas anstataŭ "...venu ĉe ni" ... venu al ni, au venu ĉe nin, au alvenu ĉe ni; ĉar veni signifas movigi ien, au de ie. Sur p.46 "Post kelkan tempo.." tekstu Post kelka tempo. La libreton mi rekomendas kiel taŭgan informilon pri la cirkonstancoĵ en la postmilita Vjetnamio, kiu metas spegulon al kelkiu el ni.

J. Kořinek

LA ROZO DE L' SULTANO. De Gyula Krúdy. Tradukis d-ro István Nagy, ilustris László Kertész. Eldonis HEA, Budapeŝto 1982. 54 pagoĵ, formato 12 x 18,5, kartonita.

Fabelo pri malgranda hungarino Elinĵo, kies fratono forkondukis turkoĵ en Istanbulon, por ke li fariĝu soldato. Al Elinĵo proponas sian helpon fileto de najbaro, la turko Ahmed, kaj ili ambau forlasis Budaburgon /jes, tiel/ kaj piede iras en Istanbulon, por liberigi la knabon. Kaj ili travivas fabelajn aventurojn kaj danĝerojn kaj bonaj homoj helpas al ili, do la afero plene sukcesas.

La historieto okazas en la 16-a aŭ 17-a jarcento, kiam Hungarlando estis sub la turka regado dum unu kaj duonjarcento. La nomoj estas transskribitaj Esperante, kun escepto de Gül-Baba, rozkulturisto kaj rozoleoprodukisto en Buda, kiu lau la postvortoj estis historia figuro. Sed oni ne klarigas, kiel legi Gül. La lingvaĵo estas bona, desegnoĵ sur ĉiu pago, multfoje pro desegno ne restis loko por teksto sur la pago. Tre konvena legaĵo por infanoĵ bone sciantaj Esperanton.

A. Stanura

LA FERMITA URBO. De István Nemere. Eldonis HEA, Budapeŝto 1982. Respondeca redaktoro Vilmos Benczik. 128 pagoĵ, formato 14 x 20,5 cm, kartonita, prezo Kĉs 26,--. Eblas mendi ĉe ĈEA.

Ĉi tiu originala Esperanta sciencfikcia romano atingas nivelon de similaj verkoĵ en la naciaj lingvoj. Inter tiaĵ oni povas distingi du specojn. Tiujn, kiuj bazigas kaj eliras el sciencaj malkovroj kaj inventoj de la lastaj jardekoĵ sur kampoj de fiziko, ĥemio, biologio, genetiko, astronomio, kosmonautiko /ekz. laseroĵ, mikroprocesoroĵ ks/ kaj kiuj supozigas pluaĵn eblojn en la estonteco de l' homaro. Kaj la duaĵ lagas senbride flugi la fantazion ĝis absurdaĵoj. Tie rolas kosmosi-  
poj veturantaĵ al aliaĵ galaksioĵ, homoj senmortaĵ, homkoloni-  
oj eklogintaĵ sur Marso, Venuso kaj aliaĵ planedoj, do eĉ sur  
tiaĵ, kie la pleĵ novaĵ esploroĵ konstatis egajn temperatu -

rojn, atmosferon de sulfacidaj gasoj ks. Se najbaraj galaksioj distancas de ni ekz. 2 - 3 miliardojn da lumjaroj kaj la lumo havas la maksimuman rapidecon atingeblan en la naturo, t.e. ĉ. 300 000 km sekunde, ni imagu kiom da trilionoj da jaroj bezonus eĉ plej rapida kosmoŝipo de homo por tia vojaĝo. Do tiaj fantaziaĵoj pli trafe nomigus sciencfabeloj.

En la romano de Nemere, kiu situas ie mezvoje inter ĉi du ekstremoj, ni trovas misteran urban artefaritan en ega ŝtonrompeja groto centojn da metroj sub la tersurfaco, kun artefarita fajrogloba suno elektre nutrata desur la tero. Estas 26-a jarcento. Psikosociologa instituto de la Mondregistaro ekzilas tien dum 170 jaroj patologie krimemajn individuojn desur la Tero. Ili estas antaŭe senigitaĵ je memoro pri sia antaŭa vivo kaj tie sube ili vivas en kondiĉoj de mezepoka homa scio. Tri malpacemaj agresemaj sciscenculoj sukcesas plenumemore penetri tien kaj uzurpi la potencon, tirani la pacemajn kamparanojn, por fine ekbatali inter si. Kun juna sciencisto-psikosociologo Mark ni travivas aventurajn kaj nervostreĉajn okazintaĵojn. La aŭtoro enplektas amepizodeton kaj filozofie-etikajn ideojn kaj konsiderojn. La solvon de la "sciencfantastika" verkaĵo trovi la legonto mem. Lingve havas la verko tre bonan nivelon.

Korektindaĵ estas nur kelkaj malgustajoj. Krom kelkpage iom "anemia" preso kun perdigantaĵ supraj literpartoj kaj supersignoj, ie eĉ tutaj vortoj /p. 45/ oni ne povas ion riproĉi al ĉi pliriĉigo de nia literaturo kaj mi povas ĝin rekomendi kiel bonan distran legaĵon.

J. Kořínek

JAN AMOS KOMENSKÝ A INTERLINGVISTIKA. Ĉeflingva eseo de doc. RNDr Vlastimil Novobilský, CSc, en "Sborník z konference 25. 3. 1982 při příležitosti 390. výročí narození Jana Amose Komenského", p. 20 - 34. Eldonis Katedro de pedagogiko kaj psihologio de la Pedagogia Fakultato en Ústí nad Labem, junio 1982.

Komence la konstato, kio estas interlingvistiko - eĉ modernaj enciklopedioj de nia "Academia" ne konas la terminon. Post la formorto de la latino kiel internacia lingvo aperis tendenco enkonduki novan internacian lingvon. Komenský laŭ logika maniero atingis la postulon pri universala lingvo, kiu estas unu el la kondiĉoj por krei kompaktan kaj harmonian sistemon de sciencoj - la pansofion. La ceteraj kondiĉoj por tiu grava kaj noblacela tasko estas komuna celado de universala sciencista kolektivo, universalaj lernejoj kaj universalaj lernolibroj. La universalan lingvon Komenský pritraktas speciale en sia "Panglotio" kaj aparte en ĝia /latina/ aldono "Unua provo pri nova harmonia lingvo". Malbonsance, la manuskriptoj estis perditaj dum tri jarcentoj kaj retrovitaĵ, en GDR, nur en la jaro 1935. Jen la kaŭzo, kial Komenský ĝis nun ne okupas en la interlingvistiko tian elstaran lokon, kiu al li plenumite apartenas. La scienca mondo ne sciis pri la ekzisto de tiuj traktatoj.

Komenský difinas la principojn, laŭ kiuj la internacia lingvo estu konstruita. Li mem ne celis krei kompaktan sistemon de nova lingvo - tiu tasko mem aperos nur post la fidinda el-



laboro de la supre menciita "Ĉioscienco" /Pansofio/. La instruisto de nacioj tamen montris per kelkaj montraĵoj sian imagon pri la konstruo de tia lingvo, ekz. per konjugacio de la proponita vorto "es" /esti/ - aposteriora, kaj "ban" -apriora. La prezenco de "es" aspektas en singularo: eges, tues, illes; pluralo: noses, voses, illies. Ĉe "ban" : bana, bane, bani; bana, bané, bani. En la pasinta tempo "es" antaŭmetas "ant" kaj en futuro "post", "ban" respektive "pa" kaj "fa". Ekz. la 1-a persono: anteges, posteges; pabana, fabana.

Komenský en la lingva sfero anticipis la postulon de Lenin: "Absolote neniu privilegion al iu ajn nacio, al iu ajn lingvo!"

J. Mařík

SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ 1982. Eldonaĵo de la Scienca Eldoncetro de UEA, Budapeŝto. 68 paĝoj 24,5 x 16,5 cm.

Unua kajero eldonita fare de la nove fondita instanco. Ĝi enhavas multe da sciencaj artikoloj el diversaj fakoj, ekz. entomologio, botaniko, arkeologio, medicino /inter aŭtoroj d-roj Josef Hradil kaj Vladimír Harna, ĈSSR/, ekonomiko, ktp. La enhavo estas do bunta kaj kompletigas ĝin pluraj redakciaj informoj, inter kiuj gravas tiu pri formo kaj nivelo de artikoloj por kunlaborantoj.

Koncerne la lingvan nivelon oni povas nenion riproĉi, tamen enestas du interesaĵoj. Inter la aŭtoroj estas pluraj doktorinoj, kaj por tiu ĉi titolo oni trovas mallongigojn Dr. /-ino/, kvankam ankaŭ la ĝusta d-rino kelkfoje aperas. Kaj la redakcio notas ĉe unu artikolo pri infanoj, kie la aŭtorino uzas la pronomon LI, ke anstataŭ LI /t.e. la infano/ estas pli bone uzi ĜI, LIŜI aŭ SILLI.

Estas dezirinde, ke esperantistoj-sciencistoj abunde legu kaj kontribuu al la sciencaj komunikaĵoj, ĉar la scienca kampo estas prestiĝa afero por nia movado.

La starto de la eldonaĵo - aperos unu kajero jare - estas sukcesa.

A. Staňura

---

el   
leterkesto

Sinjoro  
Javier Pérez de Cuellar,  
Secretary General of United Nations,  
NEW YORK, N.Y. - Usono.  
-----

Estimata sinjoro,

ni virinoj el la Esperantista Klubo en Prago, ĈSSR, okaze de nia virina tago, salutas Vin elkore kaj dankas por Via senlaca laboro, celanta al konservado de la mondopaco.

Ni petas Vin, en la nomo de niaj infanoj, ke Vi en Via penado daŭrigu ĝis al la ĝenerala senigo je ĉiuj militminacoj.

Prago, la 8-an de marto 1983.

Por Esperantista Klubo en Prago:  
Helena ŠTRUNCOVÁ, p.m.,  
estrino de EKP-virinoj.

Al ĈEA  
Prago, ĈSSR.

E-klubo en Ho Ĉi Min-urbo organizis kunlabore kun VPEA kaj nia Kulturdomo printempan renkontiĝon por revigligi la E-agon. Oni ankaŭ parolis pri la 68-a UK en Budapeŝto.

Tiun tradician novjaran feston ĉestis ĝeveteranoj de VPEA, geklubanoj kaj kampuciaj E-ĝeamikoj. Kultura programo prezentis kantojn, poemojn kaj mallongajn teatraĵojn. Se eblas sendu por nia fondjubileo de E-klubo esperantaĵojn kaj gratulojn al adreso:

ČAU LAC BO QUOC Tê Ngu Esperanto  
T.P HD CHI MINH - V N 6 Mac dinh Chi Q.I

Al la redakcio de STARTO,  
P R A G O , ĈSSR.

De la 6-a ĝis la 8-a de marto 1983 Riga centra Esperanto-klubo kun la klubo RADIETO organizis tradician printempan renkontiĝon NEĜFLOKETO '83, kiun oni dedikas speciale por la Internacia Virina Tago. Ĝia slogano estis ESPERANTON POR TURISMO, TURISMON POR ESPERANTO. La renkontiĝo okazis en pitoreska kaj tre bela loko Sigulda. Partoprenis 133 ĝeamikoj el 24 Esp. kluboj de nia lando. La programo enhavis slojdomontradon pri turismaj temoj, prelegojn, amuzajn ludojn kaj maskobalon. Krom tio ankaŭ okazis piedmarŝo laŭ Siguldaĵa monto kaj trarigardo de kavernoj ĉe la rivero Gauja.

Multaj bonaj impresoj restis post elpaŝo de aktoroj de la Riga ŝtata pupteatro, kies aktoroj prezentis al ni kelkajn fabelojn de Krilov.

Ni ankaŭ gratulis al niaj virinoj kaj knabinoj okaze de la Internacia Virina Tago kaj donacis al ili bondezirojn kaj inviton al la Tutsovetia Esperantista Junulara Tendaro.

Akceptu multajn salutojn de ĉiuj partoprenintoj de la NEĜFLOKETO '83.

Al ĈEA,  
PRAGO, ĈSSR.

Al la ĝesamideanoj en Ĉeĥoslovakio:

Mi sendas mian unuan leteron kaj mi emus amikece korespondi kun Vi.

Mi nomigas Marjo Ĥozefo Miranda, mi loĝas en Buenos Aires, Argentino. Mi agas 28 jarojn, fraŭlo, postisto, ĉarpentisto kaj mi studas muzikon per elektronika orgeno Yamaha.

Nun mi interesas multe pri Via lando, la loĝantaro, montoj, riveroj, klimatoj, ricasoj kaj ĉefurbo. Mi interesas ankaŭ iujn monumentojn, kiuj estas nenumereblaj en Prago.

Argentino havas 1 federalan distrikton, 22 provincojn kaj 1 nacian teritorion. Ĝi estas lando kun ĉiaj produktaĵoj kaj gravaj pejzaĝoj. Tie ĉi praktikadas ĉiajn sportojn kaj en la ĉefurbo estas nenumereblaj aĵoj por soikoni.

Kiujn ajn personojn interesataj pri Argentino aŭ pri mia amikeco mi sercas en Ĉeĥoslovakio kaj mi atendas Vian leteron.

Multan dankon - ne forgesu min.

En Buenos Aires, Argentino, la 8-an de marto 1983.

Mario José MIRANDA  
CASILLA 51  
1828 BANFIELD /B A/  
ARGENTINIO

## INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

### K O M U N I K O

De la 18a ĝis 20a de aprilo 1983 reprezentantoj de Esperanto organizitaĵoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando, Sovetunio okazis en Radziejowice ĉe Varsovio sian 16an Konsultigon. Ili priraktis demandojn pri la apliko de Esperanto en internacia aktiveco por paco kaj diversajn problemojn de la komuna laboro. La partoprenantoj aparte dankas al Pola Esperanto Asocio pro bonegajn laborkondiĉojn.

Radziejowice la 20a de aprilo 1983

### PRINTEMPA KUNSIDO de CENTRA KOMITATO DE ĈEA

okazis 26an de marto en Praha. La komitatanoj trektis reporton pri la agado de estraro en 1982a jaro, finanĵan jaran buĝeton, trektis pri gravaj organizaj aferoj kaj akceptis signifajn decidojn. Pri detaloj vi povas turni sin al plejproksima nia loka grupo, kie estas informoj de la komitatanoj aŭ de la estroj de niaj regionaj komitatoj.

### RESPONDO DE LA VIRINOJ EL GREENHAM COMMON

Esperantista Klubo en Praha ricevis je la Kristnaska bondeziro forsendita al la paĉatalantintoj en Anglio, Greenham Common, mane skribitan respondon, kies tradukon el la angla lingvo ni prezentas:

Kara Esperantista klubo,

dankon pro via letero, kiu subtenas nian agadon en Greenham Common. Ni ricevis multajn leterojn el Ĉeĥoslovakio kaj el la tuta mondo. Via letero apartenas al tiuj, kiujn mi scipovis legi /tio pravas la sukceson de Esperanto/, sed mi ne kapablas Esperante skribi.

Eble vi aŭdis, ke la 12.12.1982 estis por ni sukcesa tago, almenaŭ 30 000 virinoj ĉirkaŭis man' en mane la tutan bazon duoble /ĝi havas perimetron 9 mejloj/. Ni ankau estis en la ba-

zo kaj dancis kaj kantis. 36 el ni estas nun en malliberejo, unu deksepjaragulino kaj unu sepdekjaragulino. Ni unuiĝis kaj fortiĝis dank' al la subteno de la pacamaj homoj de ĉie, kiuj volas forigi nukleajn armilojn.

Martha STREET, p.m.,  
por virinoj el pactendaro  
en GREENHAM COMMON

### EN SOVETUNIO

aperis entaŭ ne longe RAPORTO de Ju.V. Andropov en la komuna solena kunsido de Centra Komitato de KPSU, Supera Soveto de USSR kaj Supera Soveto de RSFSR, dediĉita al la 60-jarigo de la fondo de Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj/okezis 2la de decembro 1982/ Sur la koverto estas kolora foto de Ju.V. Andropov. Eldonis APN en Moskvo en Esperanto. Kiu interesigas skribu rekte al Asocio de Sovetaj Esperantistoj, prosp. Kalinina 14, SSOD, SU- 103009 Moskva. La broŝuron redaktis kaj lingve preparis V. Samodaj. Ni gratules al tiu iniciato.

### NI PARDONPETAS

ke okezis tiu ne agrabla ĥaoso en la lasta STARTO kun ŝanĝoj de la paĝoj. Ni tion rimarkis kiam ni ricevis la numerojn por ekspedo. Antaŭ ni staris demando - ĉu ne akcepti numeron kaj ankoraŭ denove atendi aŭ sendi ĝin al vi kun espero, ke vi komprenos nian situacion Okezis, ke venis al nia asocio nur du plendleteroj. Nu tio inter pli ol 4 000 da legantoj ne tro signifas. Aliaj, versajne, afable jam pardonis al ni kun kompreno. Dankon al ĉiuj. Tamen vi notu, ke paĝo 20 estas 13, paĝo 13 estas 20 kaj pliaj ŝanĝoj ne estas.

### MULTAJ EL VI

mendas diversspecan esperantan varon. Okazas, ke vi ofte ne konas prezojn, stokon de nia varo, enhavon ktp. Por tiu celo servas nia kelkkolora KATALOGO. En ĝi vi trovos ĉion necesan. Ne forgesu ĝin mendi. La prezo estas 15,-Kĉs / aŭ 5,-gld/ krome de sendokostoj. Ni minimume du foje jare renovigos la enhavon kaj informos vin enkaŭ pri novaĵoj en Staro.

### KIO NE ESTAS EN KATALOGO

sed en nia stoko jes. Krome jam menciita varo vi ne forgesu pri la PEXESO - ĝi estas valora didaktika ludilo kaj por viaj infanoj kaj por maturaj homoj. Multkolore ludilo helpas lerni novajn nekonatajn esprimojn. Ĉepre mendu ĝin ĉe nia asocio. Prezo nur Kĉs 6,50 aŭ 2 gld.

### EKSKURSO EN HERO-URBON LIDICE

Asocio de virinoj, kunlabore kun Esperantista Klubo en Prago, loka grupo de ĈEA, aranĝos sabate la 18.6.1983 piediran 20 km longan ekskurson KLADNO - LIDICE - PRAGO. Renkontigo de partoprenantoj je la 7-a horo apud la kasoj de la fervoja stacidomo Praha-střed /Prago-centro/, Hybernská str., Prago 1.

### ELTIRAĴO EL LETERO EL USSR

Ni /Esperanto-klubo en urbo Niĵnevartovsk/ kun granda ple-

zuro informas Vin, ke la 22.3.1983 laŭ la peto kaj propono de nia E-klubo en 8-a lernejo de nia urbo oni organizis kaj amase malkovris grandan salonon, kiel muzeo de amikeco inter USSR kaj Ĉeĥoslovakio. Nune pionira taĉmento de nia 8-a lernejo havas nomon de Jan Nálepka. Gelnantoj ĉi pionira taĉmento bone lernas, aktive laboras en ĉi-muzeo, interkorespondas kun gelnantoj el ĈSSR, propagandas historion kaj aliajn sciojn pri Ĉeĥoslovakio inter gelnantoj de nia urbo kaj distrikto. Vivu ĉiam Soveta-ĉeĥoslovaka amikeco.

Niaj gelnantoj deziras korespondi kun Viaj gelnantoj 10-14 jaraĝaj. Sendu adresojn:  
USSR, Tjumenskaja oblast, 626440 u. Nižnevartovsk, Omskaja ulica 12-3, ESPERANTO-klubo.

#### LA 4-a PRINTEMPA SEMINARIO EN MNICHOVO HRADIŠTĚ

En urbo Mnichovo HradištĚ, ĈSSR, okazis la 13.-15.5.1983 la 4-a Printempa seminario, kiu havis riĉan kulturprogramon / Ota Dub: Lauro kaj rozo - lud s E-trio/, la loka E-klubo preparis valoran Esperantan kurson kaj autobusan ekskurson en Prachovské skály. Logado en modernaj tranoktejoj,

#### 5-a ESPERANTISTA KULTURA FESTIVALO

okazonta enkadre de la kultura semajno "26-a OPAVA DE BEZRUČ" la 16.-18.9.1983 en OPAVA

##### PROGRAMO:

- 16.9.1983: 19,00 h. - Inaŭguro de ekspozicio de P.RAK  
19,30 h. - Orgena koncerto  
17.9.1983: 9,30 h. - Solena kunsido kaj seminario  
14,30 h. - Teatra posttagmezo  
19,00 h. - Arta vespero  
21,00 h. - Amika interbabilado  
18.9.1983: 9,30 h. - Kultura antaŭtagmezo  
14,00 h. - Trarigardo de la urbo



La 5-an Esperantistan Kulturatan Festivalon organizas Esperanto-Rondeto de Uzina Klubo OSTROJ Opava sub auspicio de ĈEA memore al 25-a datreveno de morto de Petr Bezruč.

##### ĜENERALAJ INFORMOJ:

La partoprenkotizo: Kĉs 45,-- /studentoj Kĉs 30,--/.  
La logado: en hotelo de kategorio B estas disponeblaj 1 - 411-taj ĉambroj kaj komuna tranoktejo. Prezoj por enlandanoj de Kĉs 20,-- ĝis Kĉs 35,-- por unu lito kaj nokto.

#### JUS APERIS NOVA KULTURA ALMANAKO

Penoramo. Vi povos legi fakte jam heredon, testamenton, de la mortinta konata verkisto kaj regisoro Valdemar Vinař. La Penoramo enheves lian nekonatan romanon el Egiptujo. Prezo estas 16,--Kĉs aŭ 5,--Gld.

## JUNULARO GVIDAS

Unufoje en la historio de Esperantista Klubo Praha partoprenis esperantistoj unuamajan manifestacion 1983 kun flagoj ĉeĥoslovaka kaj esperantista kaj kun emblemo de la klubo. Ili portis devizon PER ESPERANTO AL PACO. Dum la viciĝo ili disdonadis propagandajn flugfoliojn kun teksto ESPERANTO NE-POCHYBNĚ / Esperanto sendube /. Tiuj folioj vekis intereson pri esperanta movado. Tiel junularo ĉefe sub la iniciatema gvido kaj organizo de Pavla J o d a s o v á digne reprezentis pacen kaj esperantistan movadon antaŭ nia registaro kaj prezidento G. Husák. Ĉu aliaj grupoj same agis en niaj urboj ? Ni volonte akceptos viajn informojn.

PARTOPRENU E - ARANĜOJN en P O L L A N D O pere de Ĉ E A  
Kotizoj por internaciaj Esperanto - aranĝoj en la 1983-a jaro - en ĉeĥoslovakaj kronoj:

57-ESP	jul.01-jul.15	Somera Esperanto-Lernejo		
		en ŚWINOUJŚCIE	.....	2 500 Kčs
58-ESP	jul.16-jul.30	"	"	2 500 "
59-ESP	aug.01-aug.15	"	"	2 500 "
60-ESP	aug.16-aug.30	"	"	2 500 "
61-EPP	jul.03-jul.10	Kajak-Ralio laŭ la rivero		
		G w d a	.....	1 500 "
62-EPB	jul.01-jul.15	Somera kurso por instruantoj		
		de Esperanto en BYDGOSZCZ		1 500 "
63-EPB	jul.15-jul.29	Internacia Infana Esperanto-		
		Vilago en BYDGOSZCZ	.....	1 500 "
168-EPB	jul.19-jul.22	Konferenco de Pola Esperan-		
		to-Junularo en BYDGOSZCZ	....	250 "
68-EPL	La XXI-a Kongreso de Pola Esperanto-Asocio			
	okazos plej verŝajne en LODZO dum okt.21 -			
	okt.23 paralele kun "OPERA-83" kaj kostos			500 Kčs

Ĉiusemajnaj kursoj kadre de la Internacia Esperanto -  
Lernejo en TORUŃ aŭ BYDGOSZCZ:

por kvartaga restado en BYDGOSZCZ /lundo-vendredo/ 500 Kčs  
por septaga restado en TORUŃ-BYDGOSZCZ /dim.-dim./ 750 "

### A t e n t o n !

Organizanto de minimume 20-persona grupo, kiu partoprenas la aranĝojn en TORUŃ aŭ BYDGOSZCZ, estas gastigata de "ESPERANTOTUR" senpage. Ĉiuj kotizoj por la Esperanto-aranĝoj en Pollando inkluzivas tranoktadon, manĝadon, programon kaj prizorgon fare de Esperanto - vojaĝgvidanto de "ESPERANTOTUR".

Aligojn de ĉeĥoslovakaj civitanoj por la Esperanto-aranĝoj en Pollando akceptas:

Ĉ E A, Jilská 10, 110 00 PRAHA 1

### STUDENTOJ LERNAS ESPERANTON

Jam la duan jaron ekzistas kaj laboras en la Pedagogia fakultato en Ústí nad Labem, ĈSSR, klubo de internacia amikeco

kaj paclaboro. La ĉefa enhavo de la klubo estas studo de la internacia lingvo kaj ĝia praktika apliko sur la internacia tereno. Ĝin partoprenas 9 studentoj /la origina nombro de 14 studentoj sinkis post foiro de kelkaj studentoj pro san- kaj studmotivoj el la fakultato/. Studentoj aranĝis por siaj gekolegoj informan ekspozicion pri sia laboro, pri kiu ankaŭ raportis la regiona taggazeto Frúboj. Studentoj korespondas kun similaj kluboj en GDR, Hungario, Japanio kaj depost la venonta jaro aktive gvidos kursojn de Esperanto en Domoj de pioniroj kaj en lernejoj.

Klubo de la internacia amikeco kaj paclaboro estas unu el la oficialaj seminarioj, kiuj devas ĉiu studento de la fakultato partopreni /en la kadro de t.n. soci-politika praktiko/. Laboro de la studentoj estas ĉiujare enskribata en ilian studregistron.

Lau nia scio estas tiu ĉi arango la sola oficiala instruado de Esperanto en la ĉefaj altlernejoj. La ekzemplo imitinda ankaŭ aliloke.

-VN-

#### LA TRANSDORSOJETO

Aperis nova titolo el - ĝis nun ne tro ofta tereno - por to. Aŭtoroj ing. NOVÁK, ing. SPÍČKA kaj d-ro HMIK verkis broŝuron pri ĉeĥa maniero de memdefendo. Libreto interesa pri enhavo kaj ankaŭ lingve - /novaj esprimoj kun vortaro/ - certe estos valora por ĉiu. Ĝia nomo estas LA TRANSDORSOJETO, enhavas 70 paĝojn de teksto kun desegnaĵoj. Dukolora koverto el kreta kartona papero. Formato A5, prezo Kčs 15,-- aŭ 4,50 gld.

#### NOVA KOLORA E-BILDKARTO

Plua el serio de koloraj bildkartoj eldonita far ĈEA montras sur 4 bildetoj konatajn Esperantajn lokojn - sidejon de ĈEA, sidejon de AE ŜSR, hotelon ESPERANTO en montaro Tatry kaj SET Lančov. Prezo Kčs 1,60 aŭ 0,50 gld. La BK bone kompletigas estintajn BK pri banlokoj kaj pri vidindaĵoj en ĈSSR. Minimuma mendo de BK estas 10 pecoj.

#### ZAGREBA RADIO-JUBILEO

Ek de 1953, fondita kiel informa fako pri novaĵoj rilataj - taj la zagreban Univerŝalan kongreson en 1953, esperantlingvaj radio-elsendoj daŭras ĝis hodiaŭ kiel Esperanto-fako. Auskultataj ankaŭ de ĉeĥoslovakaj esperantistoj. Tie ekzistas kelkaj personoj auskultantaj zagreban radio-programon 10 kaj pli da jaroj. Dankon al ili en la jubilea jaro.

Esperantlingvaj radio-elsendoj tro malmultas, pro tio la ekzistantaj bezonas subtenon kaj kuragigon. Donu ĝin auskultante la programon preparitan por Vl ĉiumarde, je la 23,45 h. laŭ MET, ondolongo 262 m.

Salutas Vin Esperanto-fako de Radio Zagreb.

-E.L.-

#### IEKA - INTERNACIA ESPERANTO-KLUBO AŬTOMOBILISTA

La klubo fondiĝis en 1965, la unua prezidanto estis konata M. JAUMOTTE, sekvis G. GRATTAPAGLIA. d-ro W. BORMANN, G. KUELMANN. Sume 1220 membroj estas en 35 landoj /30 en Ĉeĥoslovakio/. En 29 landoj IEKA havas landajn reprezentantojn kaj en la Jarlibro de UEA 60 SOS-aŭto-delegitojn.

La ĉefa celo de IEKA estas la aplikado de Esperanto en la aŭtomobilista medio. Tamen, sincere dirite, la agado kaj la re-

zulto ne estas brilaj: kelkaj gazet-artikoloj, ĉiujara kunsido okaze de universala kongreso /sekvonta en 1983 en Budapeŝto/, preparado de automobilista fakvortaro en 7 lingvoj kun 5 mil terminoj /aperos en Nederlando/. Unu el kaŭzoj de iom pasiva ekzistado de IEKA estas la nebona financa stato, bazita sole sur dumviva membro-kotizo de 4 us. dolaroj.

En la membraro de ĈEA certe estas multaj automobilistoj, kiuj scipovas konsili en la sfero de internacia automobilismo: kion IEKA entreprenu, kiel ĝi montru sin vivkapabla kaj utila ne nur por la movado, sed ankaŭ por la IEKA-membroj mem, kiel interesi la ceterajn auto-posedantoj inter ni pri organizita laboro.

Viajn proponojn sendu al la IEKA-representanto por ĈSSR: Ing. Jan WERNER, Kroftova 84, 616 00 BRNO. La sugestojn li peros al la estraro de la Klubo kaj en la budapeŝta kunsido de IEKA oni povos pri ili publike intertrakti.

/WE/

### INTERESA ARTIKOLO

En gazeto Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung, Band 35, Heft 5, 1982 /Fakgazeto por fonetiko, lingvistiko kaj komunikig-esplorado, volumo 35, kafe-ro 5, 1982/, kiun eldonatas La akademio de Sciencoj GDR, aperis artikolo de d-ro Erich SPITZ, CSc: Esperanto - eine agglutinierende Plansprache /Esperanto - aglutina planlingvo/. Tio estas eminenta sukceso de nia filologo, ĉar d-ro E. SPITZ, CSc., estas ĉefa esperantisto.

Komenca konstato: Ĉu similaj studaĵoj ne povas aperi ankaŭ en niaj ĉeĥoslovakaj fakgazetoj?

### VERKISTINO KAJ ESPERANTO

Marie KUBATOVÁ, konata al la aŭskultantoj de Radio-Praha per siaj popolaj rakontadoj, konferis en la gazeto ROZHLAS /marto 1982/ en la rubriko LA RADIO KAJ MI, interalie: Mi ne planis libroforman eldonon de miaj GIGANTMONTARAJ FABELOJ, mi volis aŭdi ilin el la radio.

Mi tre miris, kiam, post ioma tempo, venis al mi poŝtaĵo el Anglio. Ĝi estis gazeto de skotaj esperantistoj kaj daŭris momenton antaŭ ol mi sub la artikol-titolo PRI LA SPAREMA DONTINO rekonis mian DONTOVKA /Vo šetrný Dontouze a bílým čertoj/. Ĝi ja, propre, estis mia unua presita laboraĵo. Mi posedas ĝin kiel pruvon pri magio kaj sorĉoj de voĉo, portata trans la maron.

-J.M.-

# RONDETA VIVO

BRNO: Nova kurso por komencantoj funkcias ekde la 1.3.1983 kun 24 personoj. Se-majnon antaŭ ĉi tiu dato finigis la kurso 1982/1983 kun

preskaŭ ĉiuj partoprenintoj /el 18 restis 14/. Kurso por progresintoj funkcias dum la tuta jaro.

La klubo eldonis pluan BULTENON, n-ron 154.

FRÝDEK-MÍSTEK:  
FALSISTO DE BILDOJ de Vermer van Delf. Parolis s-ano



O. Malík kun diapozitivoj el la dresdena Zwinger.  
PEREO DE POMPEJO, ĉeĉe prelegis M. Skařupová.  
Ambaŭ prelegoj okazis la 20.2.1983 en kafejo Esperanto.

**H A V Í Ř O V :** En decembro 1982 la loka grupo adiaŭis kun prezidanto F. Strumínský, kin transloĝigis for el la urbo. Li prezidis la grupon dum 23 jaroj kaj faris multegon por la movado, organizis ankaŭ kongreson de esperantistoj-fervojistoj. **MULTAJN DANKOJN POR LIA LABORO.**

Dum la jarkunveno la 20.1.1983 estis elektitaj nova prezidanto Z. Heiser kaj sekcr. J. Pastrňáková. Nun okazas du kursoj por progresintoj /instruas prof. Pastrňák/, kaj kurso por komencantoj /Z. Heiser/. Por la tuta jaro estas planataj prelegoj por ĉiu monato. La loka grupo posedas belan fote kaj bilde dokumentitan kronikon, komencigantan ĉe la fondigo de la grupo, do preskaŭ samtempe kun fondigo de Havířov. La nuna jam multjara kronikistino estas J. Pastrňáková.

**H O Ř I C E :** Ĉiujn tri VERDAJN generaciojn ne tiom ofte oni povas vidi, kiel sur la fotoĵo el la jarkunveno de la loka grupo Hořice v Podkrkonoš. La jarkunvenon partoprenis 23 personoj, ne nur la membroj, sed ankaŭ gejunuloj el ambaŭ funkciantaj kursoj kaj la gastoj, inter

kiuj estis ankaŭ la direktoro de JKP Hořice, k-do Šedivý, favoranto de la loka grupo /la unua de maldekstre/. Oni spertis la amikecan atmosferon kaj la traktado estis fruktodona. La kunveno okazis la 28-an de februaro 1983.

**K O L Í N :** En februaro /la 8.2.1983/ okazis jarkunveno de Esperanta-rondeto ĉe Urba kultur-centro Kolín. Partoprenis geesperantistoj de E-klubo el Prago kaj Poděbrady. Jarkunveno de la loka grupo havis riĉan kaj interesan programon: ĉiuj kantis E-kantetojn, auskultis eksterlandajn E-kantojn el kasedoj kaj katenantajn prelegojn pri SET Lancov, E-renkontigo en Poděbrady kaj Mělník kun belaj kolor-diapozitivoj.

**L A N Š K R O U N :** Sabate la 5-an de februaro 1983 okazis en Lanškroun renkontigo de najbaraj E-klubo. Dum plenriĉa programo konatigis pli ol tridek ĉeestintoj kun problemaro de natur - protektado pere interesa prelego de ing. Hofman kun diapozitivoj, pri vojaĝado en Svedio kaj sekvis plujaj kulturaj aranĝoj. Al ili apartenis kanto-instruado de prof. Cink, poem-deklamado de s-ano Vopršál, ktp. Specialan atenton vekis muzikado de infanetoj per ligno-fajfmuzikiloj.

**P R A G O :** La 4-an - 6-an de februaro 1983 okazis jam la 2-a renkontigo de la Espe-



rantista klubo ESZTRACENCI. Ĵunaĵ geesperantistoj el 10 urboĵ en ĈSR vizitis, krom alia, la ekspozician da Nacia Gale-rio kaj jam tradician balon de ĝardenistoj /vidu la fon-ton/.

Ú S T Í N . L A B E M : En domo de Kulturo ODKP oka-zas ĉiuĵaude kurso por komen-antoĵ kaj kunveno. En kadro de la programitaj monatkunve-noj okazis la 27.1.1983, krom la ĵarkunveno kun elekto de nova komitato, prelego de A. Šolc NORDBOHEMIAJ PROTEKTATAJ TERITORIOJ. La 24.2.1983 oka-zis prelego de F. Staněk el Lovosice REMEMOROJ PRI LA VE-NKA FEBRUARO 1948 kaj la 24.3.1983 prelegis J. Kořinek EL TREZOREJO DE HUMURO DE BED-RICH ZELENKA. Doc. RNDr Vlas-timil Novobilský, ĈSc rapor-timil pri la de li en Lejpeigo ĉeestita IFER renkontigo. Dum la monatkunvenoj domiĝas in-formoj pri la enlanda kaj ek-sterlanda movado.

Dauras la E-kurso ĉe la Pedagogia fakultato gvidata de doc. d-ro V. Novobilský kaj porinfana kurso ĉe la Dist-rikta Domo de Pioniroĵ kaj ĵunularo far J. Kořinek. En la nordbohemia partia organo, ĵur-nalo Průboĵ, ni aperigis tri artikoloĵn. Artisme farataĵn invitiloĵn por la monatkunve-noj liveras apreziĵde nia sek-retario s-ano A. Šolc.

Z N O J M O : La klubo a-rangis okaze de la Internacia Semajno de Amikeco leterves-peron. Venis multaj leteroj el 9 landoj.

Pri voĵago en Sovet - Union parolis s-ano Petrželová.

#### SUMPERK

La 17an de ĵenuero okazis la ĵarkunveno de EK. La 20an de

marto estis starigita la ĵunu-lara sekcio en nombro de 6 mem-broj. Gvidas sam. Davidová. La 9e kaj 10e de aprilo estis re-aligita renkontigo kun ĵeĵunu-loĵ el Olomouc aligita kun la ekskurso al montaro Jeseníky.

La 14an de aprilo aranĝis EK publikan prelegon de s. Lexman el Zábřech kun projekcio de 3 filmoj kaj 2 serioĵ de intere-saj diapozitivoj sub la titolo " Norda Ameriko en ordinaraj tagoj " . Partoprenis 96 per-sonoĵ.

La 20an de aprilo eastis invi-titaj 3 membroĵ de nia EK al konferenco de Domo de kulturo ROH PRAMENT, kie ili estis ho-norigitaj pro laboro en EK per diplomoj kaj libroĵ.

#### BRNO

La 3.5.1983 aranĝis la klubo vesperon kun poeto Jiří Karen pri la tero : Karel Höger kaj František Kožík/ al la 100a de-treveno de Nacia Teatro/. Alt-valora kaj edifa parolado, kiun la publiko tre atente kaj kun plena intereso sekvis. La pa-roledo okazis en la ĉeĵa kaje-speranta lingvoj, ofte kun spe-cialaj glosoj al la internacia lingvo.

---

## KRONIKO

---

La 14-an de aprilo 1983 ĝisvivas gravan rondan viv-ĵubileon ĵana Ĉ Í Ĉ H O V Á, konata al ni precipe kiel tradukantino. En la kulmino de sia aktiveco ŝi kunlaboris kun pli ol 30 gazetoĵ, koni-gante precipe la ĉeĵan lite-raturon.

Sia originala p o e m a -  
r o KVAR SEZONOJ /50 poezi-  
aĵoj/ estas prespreta, eĉ ilu-  
strita.

Ŝi funkcias kiel virin-ko-  
misionestro en ČSČK, redaktis  
VERKISTAN BULTENON kaj parto-  
prenis en la Esperanto-angu-  
loj de Radio Prago kadre de  
elsendoj por Austrio. Profes-  
sie ŝi estis muzea gvidistino  
seslingva, inkluzive Esperan-  
ton.

Václav L O R E N Z, ak-  
tivisto de la Esperantista  
klubo en Prago, ĝisvivis la  
19-an de februaro 1983 75 ja-  
rojn.

Ing. Jan W E R N E R, ak-  
tivisto en nia scienco-teknika  
sekcio, farigis la 5-an de fe-  
bruaro 1983 50-jara.

Al ĉiuj koran gratulon.

#### NI KONDOLENCAS

Nur nun ni eksciis pri tra-  
gika morto de nia juna memb-  
rino Věra M A R E Š O V Á.  
Ŝi estis kapabla kaj vigla  
sportistino kaj de siaj 16 ja-  
roj fidela membrino de nia  
loka Esperanto-klubo en Vse-  
tín. La 10-an de decembro  
1981 ŝi vespere foriris en  
neĝoventego al sia kamaradino  
kaj sur transiro de la ferve-  
ja linio Rokytnice-Vsetín e-  
vidente ne audis trajnon. Ŝi  
estis 24 jara kaj ni profun-  
de kortusitaj rememoras ŝin.



La 28-an de oktobro 1982  
forlasis niajn vicojn multja-  
ra membrino de la loka grupo  
en Třebíč Milada P O L Á Č -  
K O V Á en ago de 70 jaroj. Ni  
konservos ŝin en nia dankema  
memoro.

Kun granda tristeco ni a-  
noncas ke post neloga sed gra-  
va malsano forlasis nin por  
ĉiam en sia 74-a vivjaro nia  
gentila samideano kaj antau-  
cio nia neforgesebla kamarado  
arch. Josef D R L Í K. Li  
mortis la 11-an de aprilo kaj  
funebra adiaŭo okazis la 18-  
an de aprilo 1983 en granda  
ceremonia salono de la kremato-  
torio en Prago-Strašnice.

Multjara aktivisto kaj fun-  
kcio en komitatoj de la Es-  
perantista klubo en Prago kaj  
en ĈEA. Senĉese oferema fun-  
kcio de Komunisma partio de  
Ĉeĥoslovakio, portinto de la  
ŝtata ordeno PRO MERITOJ PRI  
KONSTRUADO.

Honoron al lia laboro kaj  
memoro. Ni ĉiuj konservos lin

en nia dankema memoro. Lia familio akceptu niajn plej profundajn kondolenc-esprimojn.

Libor K Ĥ I V Á N E K, elstara esperantisto, faka laboranto de la muzeo en Písek, forpasis la 15.1.1983 en la aĝo de 56 jaroj. Li partoprenadis aktive ĉiujn gravajn E-arangojn kaj daŭre restos en nia memoro.

Jiřina M I K U L O V Á, esperdona juna frekventantino de la koresponda kurso el Ml. Bolšslav, forpasis post longa kaj grava malsano la 7.2.1983 en la aĝo de 29 jaroj, postlasante du malgrandajn infanojn. Akompanas ŝin nia tristata rememoro.

.....

Sabate la 23en de aprilo 1983 okazis en Jablonec n/N jam XIIa Printempa Porpaca Marĉo. Inter preskaŭ 400 partoprenantoj estis ankaŭ pionire rondeto JU-NECO el baza lernejo "Na va lech"el urbo Poděbrady. Ili ricevis premion dediĉita de nia asocio el plej nombra grupo de esperantista junularo. Sur bildo ili studas planon de la marĉo.



Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs au 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

Monika ZEUGNER, Neue Dorfstr.14, DDR 2851 DARGELUTZ, komencantino 23 j.dez.kor.kun social.landoj pri ĉiuj temoj de la vivo. Kol.bk.kaj reproduktadoj de pentraĵoj.

Jaroslav PALÁM, Gottwaldova str.247, 394 68 ŽIROVNICE, ĈSSR, 27 jara,dez.inters. PM kaj PI, geografmapoj, libroj pri landoj, ktp.

Vladivostoka Esperanto-Klubo, dv. 100 let Vladivostoku n-ro 103, SU-690039 VLADIVOSTOK, USSR, KULAGINU G. -instruisto, 33 jara,dez.kor. tutmonde pri literaturo,lingvoj, pentrarto, ktp.

Doris LIPOWSKI, Poststr.9a, GDR 1910 KYRITZ, instruistino por lingvoj, 26 jara,dez.kor. tutmonde pri ĉiuj temoj.

Gintaras ŽIAUNYS, Žemaiti - jos 9-25, 235500 MAZEIKIAI, Litovio, USSR - junulo, kol. PM, BK, diskojn kaj volonte interŝanĝos ilin.

Leonid SIGAL, Kirova 52, kv. 25, SU-270011 ODESSA, USSR - instruisto de matematiko, 29

jara, fraŭlo dez.kor.pri ĉ.t. kun fraŭlinoj el ĈSSR. Eblas libertempe ĉe Nigra maro.

Elizabeto SIFT, 9401 SOPRON Pf. 85, HUNGARIO, instruistino, 42 jara, organizas la 25.6.-25.7.1983 vojaĝon al okcident-europaj landoj. dez.kor.kun mezagaj s-anoj /pref.instruistojn/.

E-klubo KAMOMILO, SU-644099 OMSK n-ro 99, p.k.155, USSR, junulara klubo volas havi gamikojn en la tuta mondo kaj antaŭcie ankaŭ en ĈSSR.

Dušan DVORÁK, Horáčkova ul. 1211, CS-140 00 Prago, ĈSSR, studento 21 jara, dez.kor. TM pri naciaj kutimoj, legendoj, konstrustiloj, hinda filozofio, karate, jogo, popola medicino, inters.proverboj, citaĵoj.



Zdenka PAVLÍKOVÁ, Leninova 713, CS-757 00 VALAŠSKÉ MEZIRÍČÍ, ĈSSR - komencantino, 18 jara, dez.kor.pri literaturo, muziko, filmo, historio.

Iván ATTILA, Tito M.A-3/3-4, 24420 KANJIZA, JUGOSLAVIO - 12 jara knabo dez.kor. kun knabo kiu kolektas PM.

F. FRÝBERT, Poznaňská ul.6, CS-616 00 BRNO, ĈSSR - dez.kor. kun esperantistoj-radioamatoroj kaj aĉetos broŝuron SVETADÍL BEZ TLUMOČNÍKŮ de Oldřich Kníchal.

Vladimír ROTREKL, CS-669 02 ZNOJMO-DOBSICE 297 dez.interŝ. bildkartojn pri folkloraj kostumoj kaj pri ĉefurboj de la statoj el la tuta mondo.

Eva Marie SCHÖNFELDT, Otto-Moritz-Str.63, DDR 2760 SCHWERIN - instruistino-rentulino, 62 jara, dez.kor.TM pri turismo, kulturo, manlaboro.

H. REIFFERSCHIEDT, Bahnstr. n-ro 12, GDR 2800 LUDWIGSLUST - oficistino, 44 jara, dez.kor. kun samagulo.

Hermann SCHULZ, E. - Thälmann-Str.23, GDR 2831 VELLAHN, komencanto, 19 jara, dez.kor. pri muziko, literaturo kaj vojaĝado.

Bernd GRUBE, GDR 2851 GARWITZ, Pf.144, 16 jara, kolektas plumojn kaj dez.kor. pri ornitologio.

Andrea NÉMETH, Szabadnép u. 63, 9798 JÁK, Hungario - lernantino, 20 jara, dez.kor.pri gramadikoj, diversnacia kulturo, turismo.

Maria ŻYROMSKA, str.Budzi-szynska 130/II, WROCLAW, Pollando - inĝenierino, 27 jara, dez.kor.kun TM pri literaturo, turismo, reciproka gastigado, BK, diapozitivaj, modrevuoj.

Vladimír TRETJAKOV, ul. Juliusa Fučíka 9, kv.21, 357524 PJATIGORSK, USSR - inĝenierokonstruisto, 46 jara, dez.kor. kun samaguloj. Li ŝatas turismon kaj proponas reciprokajn gastigadon.

S-ro Marc BLONDELL, 22 rue Claude Debussy, 59130 LAMBERSART, Francujo - pensiuo dez.kor.precipe en la celo intersangi PM.

Karlo WACHOLC, str.22 Sty-cznia n-ro 26, 89300 WYRZYSK, Pollando - 23 jara fraŭlo, dez.kor.pri E-movado, harmonikludo, poezio. Inters.PM, BK, kalendaroj, suveniroj, esperantaĵoj.

Brygida SZULC, str.22 Sty-cznia n-ro 64, 89300 WYRZYSK, Pollando - 19 jara fraŭlino, dez.kor.kun TM pri ĉ.t. kun samaguloj. Kolektas E-ajojn, monerojn, kol.BK, PM, suvenirojn.

Lúsi SEIL, Rúa 81-18, 202900  
VILJANDI, Estona SSR, USSR -12  
jara knabino dez.kor.kun sam-  
aguloj.

Eda REMMET, Suve 5, 202900  
VILJANDI, Estona SSR, USSR -12  
jara lernantino dez. kor. kun  
samaĝuloj.

Ilves REIN, Rúa 79-3, kaj  
Antonen MEELIS, Rúa 79-2 16

jaraj knaboj, ambaŭ el urbo  
202900 VILJANDI, Estona SSR,  
USSR - dez.kor.kun TM.



D O N A C O J A L Ĉ E A ◀

Josef CHVOSTA, Poděbrady -  
Kčs 20,--; KOPECKÁ, Praha -  
Kčs 5,--; Stanislav LINHART,  
Pardubice - Kčs 50,--.

### ADIAŬAJ VORTOJ de la redaktoro de STARTO

Sub la preso de multaj cirkonstancoj, sed precipe pro la grandigantaj taskoj kaj devoj, kiujn kiel sekretario de nia Asocio mi devas solvpretigi, mi venis al la decido petpostuli de asocia prezidantaro mian liberigon de la funkcio de redaktoro de STARTO. Mia peto estis plenumita la 30-an de junio 1983. Samtempe venis la propono de nia Loka grupo en České Budějovice estontece la revuon pretigi.

Mi dankas al ĉiuj, kiuj helpadis al mi per konsiloj, sed ankaŭ per kritikaj vortoj. Ne estis facile en STARTO kunigi informorganizan parton de la Asocio kun kulturej informoj tiel, ke ĝi estu revuo legenda, aktuala kaj enhave divers-senca kaj bunta. Dum ĝia preparado kaj kompostado mi travivis plurajn amuzajn, streĉigajn, sed ankaŭ penodonajn momentojn.

Ĉiujn, kiujn mi ne kontentigis kaj kies lingvan senton mi tuŝis aŭ kies kontribuajojn mi ne publikigis, ĉi - ĉiujn mi petas senkulpiĝi min. Tamen je en kiu ajn lingvo preskaŭ ĉiu aŭtoro havas sian propran lingvaĵon...

Al miaj sekventoj mi deziras plenumon de bonaj sugestoj kaj ideoj, plenumon de bonaj kontribuajoj kaj ĉefe ke ili estu ĉiam tie, kie io por ni aktuala okazas.

Via Zdenko K ř i m s k ý

STARTO - informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská strato 10, 110 01 PRAHA 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6 foje jare. Responda redaktoro Zdenko Křimský. Grafika arango Milan Labašta. Desegnaĵoj Pavel Rak. Fotografajoj Dr. Kočvara, Jeníček, Hemerka, Křimský, MS Hořice, archivo. Transdonita al presejo la 28-an de aprilo 1983. Jarabono Kčs 24,--, por eksterlando Kčs 36,-- aŭ 10,50 gld, inkluzive sendkostojn. Abonantoj turniĝu al niaj perantoj, al UEA aŭ rektvoje al nia asocio.

STARTO - nepravideľný vĕstník Ĉeskĕho esperantskĕho svazu, Jilská ul.10, 110 01 PRAHA 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Odpovědný redaktor Zdenko Křimský. Grafická uprava Milan Labašta. Kresby Pavel Rak. Fotografie : P. Kočvara, Jeníček, Hemerka, Křimský, MS Hořice, archiv. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven, Praha. Předáno do tisku 28.dubna 1983. Dohlédací pošta Praha 07. Snižený poplatek za poštovné povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č. jedn. P/1-1267 ze dne 6.4.1979. Titulní fotografie: účastníci shromáždění v Pardubicích/autorem s. Hemerka/.

Experti: Strojimport, Omnipa  
Skodaosport, Strojexport,  
Technosport, Koro,  
Polytechno, Investo, Matoko.

PROJEKTAS KAJ VENDAS KOMPLETAJN MAŜINISTAJN  
KAJ ALIAJN UZINOJN, FABRIKOJN KAJ ENTREPRENOJN.  
OFERTAS KOMPLETAN FAKAN KUNLABORON DUM PRE-  
PARO DE KONSTRUAĴOJ DUM ILIA KUNSTRUADO KAJ  
POR ENKONDUKO DE MODERNIGO KAJ RACIONALIGO.



TOVARNY STROJIRENSKE  
TECHNIKY,  
kancelarová účelová  
organizace

**INPRO**

100 00 PRAHA 10, ROSTOVSKÁ 25, ČSOP

Auditeelní:

118 00 PRAHA 1, OPLETALOVA 27

☎ 22 41 81-3

☎ INPRO PRAHA

☎ INPRO 121703



HOTELO GOMEL, ČESKÉ BUDĚJOVICE, ČSSR  
OFERTAS EN 18 ETAĜOJ 189 ĈAMBROJ KUN 456  
DA LITJOJ. ĈE TABLOJ ESTAS LOKO POR 630 DA  
GASTOJ. NIAJN SERVOJN VI TROVOR EN RESTO-  
RACIO DRUŽBA, BAR-APERITIV, DANCVINEJO  
"G" KLUBO KAJ EMINENTAN RIGARDON EL KA-  
FEJO PANORAMO EN 16-A ETAGO.

HOTELOJ KAJ GASTEJOJ  
ČESKÉ BUDĚJOVICE